



EKO 2015-26 sendita el Ostendo la 20an de julio

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

## Urbestraj bonvenigoj por ILEI en du sinsekvaj jaroj

La 48-a Konferenco de ILEI (la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estis inaŭgurita en la 18-a de julio en la festsalono de la urbodomo de Ostendo, ĉemara urbo en Belgio. Samekiel antaŭ unu jaro urbestro de la konferenca loko bonvenige alparolis la kunvenintajn instruistojn. Tiuj efektive plenigis la festosalonon en Ostendo; la nuna konferenco viciĝas inter la kvar plej grandaj de pli ol sesdekjara ekzisto de la Ligo.

La urbestro de Ostendo, S-ro Jean Vandecasteele, aludis al la agnosko de Esperanto fare de Unesko en 1954, ankaŭ al la rolo de la flandra marbordo en du mondmilitoj, kiu aperas en nia konferenca temo 'Longa Paco post Grandaj Militoj'. Li elstarigis la longan historion de Esperanta agado en la urbo, kiu en 1987 unuecigis sin sub la ombrelo de la loka klubo 'La Konko', kies membroj regule kunlaboras kun la urbaj instancoj. Kelkaj tiaj iniciatoj dum la konferenca semajno donos perfektan eblon vidigi sin. S-ro Vandecasteele aludis tion: "Dank' al la plena organiza komitato de specialistoj varia programo estas preparita, kie ankaŭ eblas konatiĝi kun la lokaj loĝantoj. Estas la ŝanco por montri al ostendanoj kaj turistoj, ke Esperanto estas vivanta lingvo." Aldone al denombro de la multaj allogaĵoj de la urbo, li anoncis la lastatempan decidon nomi gravan novan straton 'Esperanto-Aleo' en nove konstruata urba kvartalo.



De maldekstre: Mirejo Grosjean (prez. ILEI), Radojica Petrovic' (respondeculo pri konferencoj en ILEI), Margaretha Symoens (LKK-ano), Stefan MacGill (vic-prez. de UEA), Marc Cuffez (Prez. LKK), s-ro Jean Vandecasteele (urbestro de Ostendo), Kristin Tytgat (LKK-ano kaj tradukado), Flory Witdoeck (LKK-ano).

Post la urbestra aparato la prezidanto de ILEI, S-ino Mirejo Grosjean, legis omaĝon pri la personeco kaj agado de Edward Symoens, kiu longtempe estis prezidanto de la Ligo. Sekvis saluto de Ariadna Garcia Gutiérrez el Kubo nome de la junularo. Ŝi esprimis la deziron, ke TEJO kaj junuloj kunlaboru pli proksime kun ILEI pri siaj instruaj projektoj. Salutis Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravecon de edukado en defendado de la paco kaj la aktivan rolon, kiun povas kaj devas ludi la esperantistaj instruistoj. Sekvis proklamo de la unua aljuĝo de la Premio Mauro la Torre (kiu mem prezidis la Ligon inter 1998 kaj 2003). Tion ricevas D-ro Davide Astori el Italio pro kompara studo de du tradukoj de la itala klasikaĵo 'Pinokjo'.

La tuto okazis dulingve, pro la gastoj kaj ĵurnalistoj; tradukadon kapable plenumis Kristin Tytgat, tiel, ke la tuto daŭru precize dum du horoj, laŭ la planoj. La malfermo finiĝis per komuna fotado ekster la urbodomo kaj bonveniga koktelo flanke de la urba registaro. La Konferenco pluiras tra pluraj tagoj; ĝi efektive arigis 159 aliĝintojn el 34 landoj (rekordo por la Ligo) el ĉiuj kontinentoj. Jam mikrokosmo de la bunto atendata en Lillo en la sekva semajno.

## Nova estraro por ILEI

La Komitato de ILEI en Ostendo elektis novan estraron por la sekva trijara periodo. La elektokomisiono forte laboris kaj aliris 14 novajn personojn, Fine arigis naŭ kandidatojn. La komitato decidis, ke la estraro konsistu el sep personoj. Tri personoj estis elektitaj por difinitaj oficoj: Mirejo Grosjean (Svislando, prez.), Vilĉjo Harris (Usono, kasisto), Emile Malanda (Sud-Afriko, sekretario). Por la ceteraj lokoj elektiĝis: s-ino Xiaofeng Gong "Arko" (Ĉinio), Elena Nadikova (Rusio), Ivan Colling (Brazilo) kaj Radojica Petrović (Serbio). Preciza taskdivido sekvos.



Trejnkurso plurtaga kun pluraj gvidantoj allogis bonan studentaron. Prezentas Katalin Kovats.

Ambaŭ fotoj: Mónika Molnár.

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: [http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado\\_kun\\_LA,\\_FA...](http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...)